

## BUĜETOJ (B) kaj REZULTOJ (R) por ILEI 2008-2011

Jen la estrara propono pri buĝeto 2011 kun komparoj kun buĝetoj kaj rezultoj el antaŭaj jaroj. Ĉi tiu buĝeto prezentas la plej fundamentan restrukturigon de la ligaj financoj de la lastaj jardekoj, eble de iam ajn. Ĉefaj elementoj estas provizo por kompensata helpanto kune kun laborloko, la rearanĝo de estraraj kostoj, kreo de fonto por reprezentaj kostoj kaj financa firmigo de la rilatoj kun niaj ŝlosilaj partneroj <edukado\_net> kaj la Esperanto-Centro Herzberg (ICH).

Rezulte de tiuj ŝanĝoj, la buĝeto antaŭvidas deficiton pli grandan ol kutime. Ĝi estas je ĉ. 6% de nia suma kapitalo. La estraro faras tion plenkonscie, ĉar sen tio la vojo al kresko de la membronombro kaj altigo de la agadnivele ne eblas. La strategio estas foruzi moderajn kvantojn de nia kapitalo en la fido ke la intensigita agado kaj novaj laborfortoj permesos al ni ene de 2-3-jaroj reveni al ekvilibraj buĝetoj kaj kreskigi nian kapitalon ĝis pli kontentigaj niveloj. Ni staras je dispono respondi viajn demandojn. Via aktiva helpo varbi membrojn kaj altiri donacojn aŭ subvenciojn rapidigos la bezonatan transformon!

Por la estraro: Julija Batrakova (kasisto), Stefan MacGill (prezidanto).

=====

Elspezoj (€)	B08	R08	B09	R09	B10	B11
Aktivuloj (afr, vojaĝoj,)	1200	472	1200	407	600	600
Bankokostoj (ĝen. kaso)	60	51	60	64	120	120
<b>Estraro</b>	<b>4800</b>	<b>3568</b>	<b>4800</b>	<b>3209</b>	<b>4200</b>	<b>4300</b>
afranko, reto	1500	1561	1500	1120	1400	1400
kunsidoj ne-konf	3300	2007	3300	2089	2800	1500
kunsidoj konf	-	-	--	-	-	1400
Fakaj k.a. kotizoj	450	431	500	444	500	500
Honorarioj ghen.	300	0	300	80	500	500
Informado, reprezentado	200	0	200	145	200	700
<b>IPR</b>	<b>5850</b>	<b>6323</b>	<b>6700</b>	<b>6722</b>	<b>7400</b>	<b>7200</b>
presado	2800	2840	3000	3640	3700	3700
redaktado	750	784	1000	1000	1000	1000
sendado	2500	2313	2700	2082	2700	2500
<b>Juna amiko</b>	<b>5950</b>	<b>4555</b>	<b>6150</b>	<b>5282</b>	<b>6700</b>	<b>6100</b>
presado	2200	1868	2200	1719	2200	2000
redaktado-honorarioj	1250	374	1250	802	1700	1300
afranko	500	2313	2700	2761	2800	2800
Libroj, materialoj	200	106	200	2000	1200	200
Projektoj (nete)				3735		
Rentumo uzata por pasivoj				305		
Rezervo por volontulo						2400
Kontribuo al Fondaĵo E-urbo, cele al volontula laborloko						1000
Instruisto-trejnado: Retkurso ĉe edukado.net (de Fonduso Szerdahelyi.)						1000
Tri-jara kurso Poznan: (500 de Fonduso Szerdahelyi, 500 de UEA)						1000
Foruzo de la ceteraj disponigoj de UEA por la agadoj difinitaj sub 'enspezoj'						2000
Projekto 125 – preparfazo						500
<b>SUMO:</b>	<b>19510</b>	<b>15880</b>	<b>26130</b>	<b>22394</b>	<b>34220</b>	<b>28120</b>

### Notoj pri elspezoj:

Nova skemo estas aplikata ĉe estraraj kostoj. Ni komencas mildigi la kostojn por estraranoj ĉeesti, kunsidi kaj labori en la ILEI-konferenco; la pagipovo de estraranoj estas multe pli varia nun ol pli frue; kiel eble plej multaj estraranoj estas bezonataj en la konferenco. Tio eblas praktike sen altigi la buĝetitan sumon, pro la signifa falo en la enkontinenta prezo de vojaĝado al eksterkonferencaj kunsidoj.

Al 'Informado' estas aldonita kostoj de reprezentado de la ligo en movadaj kaj ekster-movadaj aranĝoj, tial la sumo kreskas.

Laŭ la statuto, (7.1.16) la komitato decidas pri 'oficoj plenumotaj de pagata oficisto.' Nia volontulo ne estos oficiale salajrata, tamen por respekti la spiriton de tiu alineo, la estraro aperigis maje en la retejo kaj en la Konferenca Libro de Matanzas liston de eblaj taskoj plenumebaj per kompensata helpanto. Aprobonte ĉi tiun buĝeton, kun konscio pri tiu tasklisto, la komitato plenumas la provizon de la statuto.

La salto en la kostoj ĉe Libro en 2010 okazis pro nia kuneldonado de la libro 'Detala Gramatiko de Esperanto', kiun ni ekvendos en 2011. Ni ne antaŭvidas signifajn eldonprojektojn en 2011 – kostoj de la simpozia kajero 2011 venos el la simpozia buĝeto.

Informoj pri la rezultoj 2010 ankoraŭ ne estas je dispono.

<b>Enspezoj (€)</b>	<b>B08</b>	<b>R08</b>	<b>B09</b>	<b>R09</b>	<b>B10</b>	<b>B11</b>
Donacoj al ĝenerala kaso	2100	494	2100	426	500	500
Ekzamenoj UEA-ILEI nete	200	342	200	0	300	100
Konferenco nete	300	9	2200	3909	500	2000
<b>Kotizoj</b>	<b>8850</b>	<b>8167</b>	<b>8850</b>	<b>7554</b>	<b>8650</b>	<b>9100</b>
A-landoj	7200	6443	7200	5562	6800	6700
Abonoj IPR	300	217	300	281	300	300
B-landaj	1000	1098	1000	1211	1100	1100
Retaj	350	408	350	500	450	1000
Rentumo	100	249	150	305	50	600
<b>Juna amiko</b>	<b>4080</b>	<b>4821</b>	<b>4380</b>	<b>3779</b>	<b>4580</b>	<b>5000</b>
Abonoj	4000	4697	4300	3522	4500	3900
Vendoj kaj donacoj	80	124	80	257	80	300
Projektaj apogoj		-		-	1500	800
Librovendoj	400	272	800	202	800	500
Projektoj				3735		
<b>Projektaj disponigoj de UEA (petotaj por 2011)</b>						<b>2500</b>
Simpoziaj kostoj (CED estos nia partnero)						1000
Postsekvado de la Latinamerikaj atingoj el 2009						500
Universitata agado – 3-jara kurso-lanĉo (aldone al la 500 de ILEI)						500
Azia kaj Afrika agado (depende de proponoj)						500
Kaso Szerdaheji (1000 por retkurso, 500 por Poznan)						1500
Kontribuo al Fondaĵo E-urbo, cele al volontula laborloko (el kapitalo)						1000
Volontulo (duono de kostoj el kapitalo, duono el la jara spezokonto)						1200
<b>SUMO</b>	<b>19510</b>	<b>15880</b>	<b>26130</b>	<b>22394</b>	<b>34220</b>	<b>24000</b>
Pluso/minuso	-1330	-824	0	-2483	-840	- 4120

### **Notoj pri enspezoj:**

Optimismo ĉe kotizoj kaj donacoj dependas je signifa varbkampanjo, ekde la jarfino, kaj bazas sin je la kresko de 10% en la membronombro notita por 2010. Tiu varbkampanjo estas lanĉita, pere de plenkolora varbilo dissendita kun *Juna amiko* 2010/3 (dec 22, 2010) kaj atendeble dissendota kun IPR 2011/1. La varbado okazos ankaŭ rete.

La finsumoj en la buĝeto 2010 signife pli altas ol en antaŭaj jaroj, pro multaj projektoj aldonitaj, kies financado pasus tra la kontaro el diversaj fondusoj (Interkulturo, Flugiloj...) al la koncernaj projektoj. Do, tio ne malekvilibrigis la spezokonton por 2010, sed altigis la sumon. Tiuj ne estas aldonitaj al buĝeto 2011, do ĝiaj sumoj reiras al historie pli kutimaj altecoj.

Ni ja fidus je financa kontribuo de UEA al projekto 'Esperanto125' dum 2011, sed ne enkalkulas tion, ĉar la nivelo de ilia kaj alia partopreno bezonas plian klarigon.

Pri la nivelo de la negativa saldo, bonvolu legi en la enkonduka teksto.